

la verda stelo

**ESPERANTO
NEDERLAND**

**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

decembro 2008



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

tel. +3150 527 45 72

retadreso:

prezidanto.groningen@esperanto.hobby.nl

sekretario

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom

Huygensstraat 27

9727 JA Groningen

tel. +3150 525 00 86

retadreso: wvganswk@xs4all.nl

kasisto

s-ro L. Staghouwer

Julianalaan 25

9781 ED Bedum

tel. +3150 301 40 15

retadreso: luitstaghouwer@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman

Westerein 14 a

8571 GB Harich (Frl)

tel. +3151 460 22 72

retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1

ĉiun alternan jaŭdon ni kunvenas

de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

Koos Scharroo

Harm Roeters

retpoŝto: laverdastelo@pingveno.nl



Enhavo

3 ... Klubkunvenoj, naskiĝtagoj

4 ... Pri la nordo

9 ... Plej malnova homa cerbo eltrovita

10 ... Pasporta Servo

12 ... Vikipedio

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2009

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO) € 12,50

Gezinslid € 6,25

Donateur (minimaal) € 7,00

Abonnement LA VERDA STELO € 7,00

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van

ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. **ESPERANTO NEDERLAND** te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X) € 27,50

Gezinslid € 8,00

Klubkunvenoj

januaro

- 8 vivanta gazeto
22 filmo *Vizito al la Centra Oficejo*

februaro

- 5 pri *Ubuntu* – prelegos *Johan SWENKER*
19 jarkunveno

marto

- 5 pri *Hans C. ANDERSEN*
19 serĉu la erarojn

aprilo

- 2 ludoj
16 aŭskultu kaj respondu
30 **ne okazos!** (naskiĝtago de la reĝino)

majo

- 7 gastpreleganto
21 **ne okazos!** (Ĉielirtago)
30 al *Gaasterland* (Frislando) – okazos **sabaton!!**

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia
retejo sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

januaro

- 4 W. van Ganswijk-Vlasblom
13 G. Lanooy-Nijlunsing
27 Ineke Emmelkamp
30 A.W. van der Veen

marto

- 24 E.J. Begeman



februaro

- 11 H. van Kappen
17 A.A. Bellekom
18 S. Kok-Czeswinska
22 C. Boer-Pierie
28 L.H. Staghouver

aprilo

- 1 T. Bulk-Beenen
6 P. Kappen-v.d. Kamp
7 A. v.d. Meer
17 M.K. Heide

Naskiĝtagoj


Pri la nordo

18 septembro 2008

ROB MOERBEEK estis en tiu vespero nia gastpreleganto. La temo de lia prelego estis *novaj eldonoj de Esperanto-libroj*. Pro tio li kunportis tornistran kaj valizon kun multaj novaj libroj.

Li rakontis, ke en la jaro 2007 aperis 225 libroj kaj jam 100 ĝis nun en 2008. Li montris al ni originale verkitajn librojn pri kulturo kaj literaturo, studolibrojn, kantolibrojn, infanlibrojn kaj multajn librojn tradukitajn. Lastjare

Stano Marček el Slovakio eldonis studolibrojn tre aktive, kaj *Gerrit Berveling* el Zwolle jam dum multaj jaroj aperigas tradukojn de verkoj el la antikva tempo. Cetere estas nuntempe tre aktivaj verkistoj kaj tradukistoj rusaj.



studolibro de *Stano Marček*

Konataj nomoj nederlandaj estas *Ziko van Dijk*, kiu verkis la libron *Informado Praktike*, kaj *Benata Hengstmengel-Koopmans*, kiu tradukis la libron *Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi* de *Hans Ulrich*.

Stefan MacGill verkis novan libron kun teatraĵoj, dum Rob mem estas verkanta por NGGE *Ekzamenan Ekzercaron*.

Krom montri multajn librojn kaj informi pri ili, Rob ankaŭ voĉlegis kelkajn tekstopartojn el la libro *Esperanto, movado – strategio – estetiko – rakontoj*, de *Ignat Florian Bociort* kaj el *La Lingvo Serena* de *Baldur Ragnarsson*.

Rob parolas Esperanton tre flue! Kiam nekonato iam aŭdis Rob parolanta kun alia esperantisto, venis la rimarkigo: "Vi parolas la hispanan lingvon fuŝe!" Pri tio Rob tre amuziĝis.

Johan kore dankis lin pro lia veno.

2 oktobro 2008

OKAZIS LA ĉi-jara Malferma Vespero.

Venis 2 gastoj ekster s-ro *Heeroma*.

Ĉiam, kiam ni okazigas malferman kunvenon, ni ŝatas aŭdi kial la ĉeestantoj eklernis Esperanton, aŭ kial ili venis.

Dum tiu prezentado Wil diris, ke ŝi pretas gvidi kurson, kondiĉe ke estas 5 partoprenantoj minimume.

Dum la sama prezentado niaj gastoj diris, ke ili jam konas iom da Esperanto. Unu eklernis ĝin antaŭ multaj jaroj, kiam ŝi studis ankaŭ la hispanan. Tio estas malbona kombinaĵo, ĉar la lingvoj tro similas unu la alian.

La alia jam sekvis la interretan kurson ĉe Koos.

Poste ni kantis. Ĉu vi ŝatas kanti? Kelkaj ne, kaj tion eĉ anoncis. Ja aliaj ŝatas kaj konfirmis tion post demando.

Ĉar niaj gastoj jam iomete konas la lingvon, ili povis traduki simplan teatraĵon. Wil kaj Johan voĉlegante ludis, la gastoj tradukis. Estis bona ekzerco por ĉiuj.

Kion vi diras kiam ne-esperantisto de-

mandas vin: "Kiel sonas Esperanto? Simple diru ion al mi!" Je tiu demando Wil havas bonan respondon. Estas jena mallonga rakonto:

Estis nokto, tre malluma nokto. Rabistoj sidis ĉirkaŭ la fajro. Unu ekstaris kaj diris: "Estis nokto, tre malluma nokto. Rabistoj sidis ĉirkaŭ la fajro. Unu ekstaris kaj diris:..." ktp.



16 oktobro 2008

PRO MALSANO de Harm Roeters la anoncita prelego ne okazis, anstataŭ kio ni okupiĝis jam nun pri la ekzamen-ekzercoj, kiuj estis en la programo de la 30-a de oktobro. Kiel kutime ni unue parolis pri kelkaj freŝdataj sciindaĵoj en Esperantujo.

Koos ricevis informojn de nia membro *Dirk Rietdijk* pri la refreŝigo de *Zamenhof-parko* en Leeuwarden, kaj ankaŭ inviton de *Esperanto-ligo Malsupra Saksio*.

Li ankaŭ ĉeestis kunvenon en *Herzberg* por Esperanto-instruistoj (de la 2-a ĝis la 5-a de oktobro). Kunvenis proksimume 20 personoj el 9 landoj. Estis traktitaj diversaj instrumentoj, interalie la *Zagreba Metodo*. Tiu metodo estas bazita sur la 500 plej ofte uzataj morfemoj en Esperanto. Morfemo estas la plej malgranda signifohava unuo en lingvo.

Ĉeestis Cseh-instruistino *Sabine Trenner* kaj ankaŭ *Stefan MacGill*, kiu demonstris rolludojn kiel instrumentodon.

Rudolf Fischer esploris kune kun kelkaj

partoprenantoj diversajn lernolibrojn rilate al la nova *Komuna Eŭropa Referenc-kadro* por lingvoj.



Skabeno Roel Sluiter re-inaŭguras en Zamenhof-parko, Leeuwarden

La pola ĵurnalo *Gazeta Wyborcza* eldonis kompaktdiskon pri Esperanto. La disko estis aldonita kiel senpaga ekstraĵo al ĉiuj 364.000 ekzempleroj de la gazeto de la 10-a de septembro.



Gazeta Wyborcza

Wil ricevis retmesaĝon pri la EMAS-kulturtago (Esperanto en Malsupra Saksio) en Bremeno, kiu okazos la 22-an de novembro. En la informilo de la Esperanto-grupo Bremen ŝi legis, ke 'estos atendita ankaŭ grupo de Esperanto-klubo Groningen (Nederlando) kiu 'espereble ion prezentos pri sia lando'. Partoprenos tiun kunvenon eble Wil kaj Ineke.

Ŝi ankaŭ ĉeestis studotagon en Hago, kie parolis *Stano Marček* pri sia laboro, interalie pri sia libro *Esperanto per rekta metodo*.

Ĉeestis ankaŭ *Wim Jansen*, kiu uzas la libron dum la instruado en la universitato de Amsterdamo.

Pro laboro je la reloj Wil atingis Riouwstraton kun grava malfruo.

Wil kaj Koos ĉeestis la feston okaze de la okdekjariĝo de nia membro *Hylke Bron*.

La gastoj laŭpete donacis monon por *Bona Espero* en Brazilo. La monon oni uzis por aĉeti ŝuojn ledajn anstataŭ la kutimajn plastajn.

Luit informis pri la progresoj de sia afrika korespondamiko *Joseph* en Pollando.

Wil informis, ke la du gastoj de la Malferma Vespero sin anoncis por parola Esperanto-kurso.

Ĉeestos la instruadon ankaŭ du personoj, kiuj sin anoncis por eventuala kurso dum la Liberiĝo-festivalo.

Wil disdonis kelkajn ekzamen-ekzercojn, kiuj estas en la libreto *Internaciaj Ekzamenoj* de ILEI-UEA.



La taskoj de la elementa ekzameno ne kaŭzis problemojn. Ne same facila estas la tasko de la meza ekzameno. Pluraj el la malofte uzataj vortoj neniu el ni iam uzis.

Ĉu vi scias kion signifas ekzemple *rakedo, levkojo, plumulo, arpentio, rajo, spiko, patelo, pedelo, spondeo, bivo kaj kiraso*?

Koos kunlaboris kun iu el siaj kursanoj, kiu kapablas aldoni lingvojn al la fama populara helpilo *Tomtom*, tradukante la parolatajn instrukciojn de tiu orientilo. Alia nomo por tia aparato estas *birilo* (biri = peilen), sed *ŝofor-sufloorilo* reflektas la funkcion pli klare.

30 oktobro 2008

LA KUNVENON ĉeestis 6 personoj. La titolo de prelego de *Harm Roeters* estis: *Trompo kaj propra profito*. Sed antaŭ ol li komencis, ni preparolis kelkajn Esperanto-sciindaĵojn.

Luit atentigis nin pri tio, ke *Nanne Kalma* kaj *Ankie van de Meer* kune prizorgos muzikprezentadon en la *Kloosterkerk* en The-singe la 2-an de novembro je la 15-a.

Nelly montris al ni artikolon el *Onze Taal* de *Marc van Oostendorp* kun la titolo *Geen Fransen met Engelsen, maar mensen met mensen*.

Johan esploras la eblon anonci niajn kunvenojn en *De Weekkrant van Groningen*.



Telefone Wil aŭdis, ke *Ginta Uittenboogaard* prelegos ĉe ni la 13-an de novembro.

Harm ĉeestis kunvenon de *Trojka*. Tie li renkontis ok personojn, el kiuj kelkaj interesiĝas pri lernado de Esperanto.

Okaze de la ĵus eldonita Biblio en la Groningen-a dialekto ni iom preparolis la Esperanto-eldonojn de la Biblio.

Post la kafumado Harm ekprelegis. Beboj jam kapablas trompi plenkreskulojn diversmaniere. Kiam oni rajtas trompi? Kial ni kutime ne trompas? Por multaj homoj trompo ne plu estas tiel danĝera kiel en la pasinteco, ĉar multaj ne plu kredas je eterna puno kaj infero. Eble strebo al propra profito ankriĝis en niaj genoj. Sekvis komplika ludoteorio pri du batalmanieroj kaj du strategioj, nome tiuj de akcipitroj kaj de kolomboj. Kalkulo montris, ke neniu el ambaŭ strategioj profitigas. Tro multaj kolomboj estigas pli da akcipitroj kaj reciproke. La situacio ekvilibras.

Kiel kontraŭfortojn Harm pritraktis tri etikojn, nome la religian dev-etikon, la dev-etikon de Kant, kaj la virt-etikon. Estas sense ordoni al araneo ne fari reton. Ĉu estus same sense ordoni al homo ne strebi al propra profito? Jes, sed homoj tamen povas elekti kion fari, kiel agi, kontraste al araneo.

Harm finis sian prelegon per teksto el la Biblio: *kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus la animon?*

Se interesas vin la tuta enhavo de la prelego, vi petu Harm ĝin sendi al vi.

13 novembro 2008

VENIS AL nia klubo eksterlanda gasto. Ĉu vere eksterlanda? Ne, *Ginta Uittenboogaard* loĝas jam dek jarojn en Nederlando. Origine ŝi estas litovino. Ni do petis ŝin paroli pri sia lando. Sed unue ni parolis pri vetero kaj cetero. Sed nur mallonge. Pri tio mi raportas nur la anoncon de Harm Roeters. Li ricevis leteron el Irano, kun danĝere aspektaj arabaj literoj, sed ili tute ne estis danĝeraj, estis literoj eĉ ne arabaj sed persaj. La enhavo estis lia internacia Esperanto-diplomo.

Plej entuziasme Ginta parolis pri la liberiĝo de Litovio en 1990. Komenciĝis per *Balta Vojo* en 1989. Tio estis ĉeno konsistanta el 2 milionoj da homoj, man-en-mane de Vilnius ĝis la ĉefurboj de Estonio kaj Latvio. Ĝin organizis la movado pri liberiĝo. La movado sukcesis ankaŭ haltigi tankojn, kiuj estis survoje al la parlamentejo.

Per radio ili simple petis la popolon veni al la parlamentejo por helpi, kio efikis!

Tuj post la liberiĝo la komerco devis rekomenci. Dum la rusa tempo ĉiuj komercaj rilatoj okazis tra Moskvo. Poste ne plu estis kontraktoj. Produktoj litovaj krome ne estis bone vendeblaj je la malferma monda merkato. Laŭ rusaj normoj ili estis bonaj, sed internacie ne sufiĉe bonaj.



Litovio

Kiel granda estas via loĝejo? Kiam Ginta loĝis ankoraŭ ĉe siaj gepatroj, ŝi loĝis en du-ĉambra apartamento 25 kvadratajn metrojn granda kune kun frato kaj la gepatroj. Tio estis eĉ luksa, ĉar la normo estis 5 kvadrataj metroj por persono. Poste venis bofratino kaj infano...

Vi pravas, tio estas tute alia ol en la nuna Nederlando. Ginta miris, kiam ŝi iris al 5-ĉambra loĝejo, kie vivis nur unu homo, ŝia

posta edzo. En la domo ŝi aŭdis sonojn kaj daŭre sin demandis: kiom da homoj loĝas ĉi tie?

11 decembro 2008

OKAZIS NIA festa Zamenhof-vespero. Ĉeestis dek du esperantistoj el kiuj kvar estis specialaj, nome *s-ro Emmelkamp*, nia sola donacanto, 93-jaraĝa, kiu, mi scie, neniam ĉeestis iun klubkunvenon; *Johan Zwart*, kursano de Wil, kaj unu el la novaj membroj, *Erik Koelewijn* el Assen, eks-interretkursano, kaj *s-ino Hiemstra*, esperantisto jam delonge kaj abonanto de nia klubgazeto *La Verda Stelo*.



festa vespero

Bonveniginte, Johan donis al ŝi la parolon. Ŝi rakontis pri iama vizito kun sia edzo al Gambio, kaj pri la aventuroj tie spertitaj.

Wiebren regalis nin ĉe la kafo per bongustaj belaspektaj frisaj tortetoj. La aliaj jam metis ĉion, kion ili kunportis por la memserva bufedo, sur la tablon kiu ĝuste pro tio aspektis tre alloga.

Wil voĉlegis kelkajn tekstopartojn el la libro *Zamenhof* de *Marjorie Boulton* pri la vivo de Zamenhof, lia junaĝo, lia prelego dum la unua kongreso, la lasta periodo de lia vivo kaj pri la entombigo.

En tiu prelego li diris interalie:

Estas vero, ke multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ tre malbone kaj malfacile

balbutas anstataŭ paroli flue. La kaŭzo de la balbutado kuŝas ne en la lingvo, sed nur en la nesufiĉa ekzerciteco de la direktaj personoj!

Ŝajnis kvazaŭ li alparolis nin!

Post taso da supo preparita de Luit kaj akompanata de diversaj specialaj panpecoj, ni povis iri al la alloga tablo kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Ĉio estis tre bongusta.

Post la deserto Koos voĉlegis amuzan antaŭkristnaskan rakonton pri leporo, kiu anstataŭ esti preparita por la vespermanĝo sukcesis fuĝi, okazigante tre konfuzantajn situaciojn en la kuirejo kaj loĝoĉambro.



Post la priparolo de la novjara programo ni kune reordigis la salonon kaj deziris unu al la aliaj agrablajn festotagojn. Ĝis revido en la nova jaro. (Wil)



PLEJ MALNOVA HOMA CERBO ELTROVITA

Arkeologoj trovis la restaĵon de io, kio povus esti la plej malnova supervivanta homa cerbo iam trovita en Britio. La teamo elfosis ĉe loko en la Universitato de York, eltrovis kranion kiu enhavas flavan substancan. Skanilo montris, ke ĝi estas kun-tiriĝinta, sed cerboforma. Cerbo konsistas el grashava histo, kiun mikroboj en la grundo sorbas. Tiel neŭrologoj kredas, ke la trovaĵo povus esti ia fosiliĝinta cerbo.



La kranio estis trovita en loko unue loĝata antaŭ pli ol 2000 jaroj. Pliaj testoj devas esti faritaj por determini kio estas efektive tiu substanco. La teamo de *York Archaeological Trust* estis dungita de la universitato por fari esploradon en *Heslington East*, kie devas etendiĝi la universitatejo. La kranio estis trovita en loko de vasta prahistoria agrikultura pejzaĝo de kampoj, vojetoj kaj konstruaĵoj kiuj datiĝas de almenaŭ 300 antaŭ Kristo. La arkeologoj kredas, ke la kranio, kiu estis trovita sola en kota kavo, eble estis rita donaco. Ĝi estis kondukita al la Universitato de York kie skaniloj rigardis la kranian enhavon.

Philip Duffey, la neŭrologa konsilisto, kiu skanis la kranion, diris, ke la trovaĵo estas 'miriga'.

"Estas ekscite, la skanado montris struktu-

rojn, kiuj ŝajnas neambigue el cerba deveno. Mi pensas, ke estos tre grave eltrovi kiel ĉi tiuj strukturoj trapasis jarcentojn, ĉu estas spuroj de biologia materialo ene de ili kaj, se ne, kio estas ilia kunmetaĵo."

Li aldonis: "Ĉi tio povus esti la ekvivalento de fosilio. La cerbo ĝenerale ne supervivas. Grashavaj histoj estas elmanĝitaj de mikroboj. Tio ne estas kiel restaĵo trovita en ŝlimejoj; ne estas haŭto sur la kranio kaj neniu histo restas aliloke. Estas kurioza metodo laŭ kiu la cerbo estis traktita, eble io estis aldonita al ĝi, kio konservis la formon de ĝi."

D-ro *Sonia O'Connor*, esplorstudento en arkeologiaj sciencoj ce la Universitato de *Bradford* diris ankaŭ: "La supervivo de cerba restaĵo kie neniu aliaj molaj histoj konserviĝas estas ekstreme malofta. Ĉi tiu cerbo estas tial ekscita, ĉar ĝi estas tre bone konservita, malgraŭ tio, ke ĝi estas la plej malnova iam ajn trovita en Britio, kaj unu el la plej fruaj tutmonde."

La trovaĵo estas la dua grava dum prifosado ĉe la ejo. Iom antaŭe ĉi-jare, teamo de la universitata departemento de arkeologio eltrovis malprofunde skeleton de viro kiu kredeble estis unu el la plej fruaj viktimoj de tuberkulozo. Radiokarbona datado sugestas, ke la viro mortis en la kvara jarcento, la malfrua Romia periodo. La rektoro de la Universitato de York, profesoro *Brian Cantor* diris: "La kranio estas alia tre tre miriga trovaĵo kaj ĝia plia pristudo provizos nin per senkomparaj enigardoj en vivo en la Fer-epoko."

Specialistoj nun esperas efektiviĝi antaŭ-enigajn testojn al la kranio por konfirmi kiel ĝi restis kvazaŭ sendifekta tiel longe, kaj eble por scii pli pri la persono kies cerbo ĝi estis. (fonto: Eventeo.net)

Pasporta Servo

LASTATEMPE APERIS du gravajn komunikojn pri la fama *Pasporta Servo*. Bonvolu legi unue pri la *adiaŭanta* kaj poste pri la nova kompilanto.



Karegaj PasportServuloj,
Unue, bonvolu diskonigi la fakton, ke la malnova ret-adreso de *Pasporta Servo* ne plu funkcias ekde la 9-a de novembro. La nova retadreso estas pasportaservo@tejo.org.

Ankaŭ la reta aliĝilo en la retejo de *Pasporta Servo* provizore ne funkcias, ĉar ĝi ankoraŭ sendas al la malnova retadreso.

Due, blovas freŝa vento tra *Pasporta Servo*. Dum vi legas tion ĉi, TEJO arde preparas konstruon de nova reta administra sistemo, per kiu eblos pli facile administri la estontajn eldonojn. Tamen, mi ne estos la kompilanto. Post 15 jaroj da kompilado estas bone, se juna kaj entuziasma postsekvanto transprenos.

Vere ne estis facila decido, ĉar *Pasporta Servo* iomete fariĝis mia infano. Sed estas pluraj kialoj por transdoni la laboron ĝuste nun. Mi ekzemple planas transloĝiĝi dum la venontaj monatoj, do ĉiuokaze necesos paperpoŝta adresoŝanĝo. Krome mi lastatempe havas malpli da libera tempo. Fakte ankaŭ ekmankas al mi energio kaj entuziasmo. Sed plej grave estas, ke enkonduko de nova administra sistemo estas perfekta

momento por transdono. Postsekvanto havos la eblon aranĝi la administran laboron laŭ sia plaĉo.

Ne zorgu, mi planas ĉion bone transdoni. Mi disponigos ĉiujn dosierojn kaj dokumentojn, transdonos la arkivon kiun mi havas, klarigos laŭeble, plusendos mesaĝojn kaj paperpoŝtaĵojn ktp., ktp. Ĝis TEJO trovos postsekvanton, mi traktos la plej urĝajn aferojn, sed mi ne eklaboros por la venonta eldono.

Se interesas vin labori pri la plej furora eldonaĵo en la Esperanto-mondo, la libro kiun pli ol mil homoj ĉiujare arde atendas, informiĝu ĉe la prezidanto de TEJO (gregor@tejo.org). Necesos nur ekzakteco kaj tre fidinda retkonekto. Se vi havas demandojn, mi volonte klarigos per persona mesaĝo, sed la nova reta administra sistemo certe multon ŝanĝos kaj faciligos.

Multan dankon al ĉiuj Landaj Organizaĵoj, gastigantoj kaj uzantoj de *Pasporta Servo*, kiuj kunlaboris, helpis, skribis, faksis, telefonis, sms-is kaj retumis dum la multaj pasintaj jaroj. Per viaj afablaj vortoj mi eltenis tiom longe!

Derk Ederveen.



DUME ANONCIS sin de la Servo nova kompilanto.

Legu lian sinprezenton:



2008-12-13

Saluton, karaj Pasportservanoj, landaj organizantoj kaj ĉiuj, kiuj legas ĉi tiun mesaĝon.

Mi estas Joop Kiefte, konata en Interreto ankaŭ per la kromnomo LaPingvino. Vi verŝajne jam scias, ke Derk Ederveen rezignis kiel kompilanto de Pasporta Servo. Mi transprenas lian taskon.



Hieraŭ mi transportis la necesan administracion de Pasporta Servo de Voorburg al Ede, kie mi loĝas. Mi metos la aferojn en la komputilon kaj iom post iom estos mia tasko pri Pasporta Servo ĉion transpreni kaj plufunkciigi.

Derk penis klarigi al mi ĉion kiel eble plej bone, kaj vere estas tre klara sistemo per kiu li laboris, mi do estas sufiĉe kontenta.

Mi legis ĝis nun multajn dubojn kaj demandojn, ĉiujn rilatajn al la apero de la 2009-versio de Pasporta Servo. Mia intenco estas kiel eble plej baldaŭ ĝin aperigi. Tio signifas, ke kiel eble plej baldaŭ estos forsenditaj la konfirmiloj paperaj, kaj iom

poste ankaŭ la elektronikaj.

Estas tamen iom komplika situacio, ĉar venos nova sistemo por Pasporta Servo. Mi klopodos funkciigi la korespondadon kaj administradon tiel, ke vi kiel eble malplej suferos pro la transiro. Vi tamen kalkulu, ke ne ĉio bone iros jam dekomence. La nova sistemo entenos novan retpaĝon pri Pasporta Servo, kiu funkcias kiel amikeca reto inter la gastigantoj kaj aliaj pasportservanoj, kaj kiu cetere faciligu la laboron de la kompilanto. La libreto de Pasporta Servo tamen ne malaperos, kaj vi daŭre povos indiki, ke vi ne aperu en la retpaĝo.

Mi estas de nun je via servo, kaj bonvolu esti pacienca pri mi...

PasportServe,

Joop Kiefte

nova administranto de Pasporta Servo

retadreso: pasportaservo@tejo.org

fonto: www.eventoj.hu



Vikipedio

NOVA LIBRO de Ziko van Dijk popularigas Vikipedion

Dum la Universala Kongreso en Roterdamo oni multe interesiĝis pri Vikipedio, kiel atestis tri bone vizititaj aranĝoj. Montriĝis, ke multaj homoj deziras ne dependi de helppaĝoj en la reto, sed havi praktikan instrulibron apud la komputilo. Jam elĉerpiĝis la populara *Manlibro pri Vikipedio*, kaj por pleni


nigi la breĉon nun aperis la nova verko *Vikipedio por vi*, de Ziko van Dijk.

Ĝi klarigas la fenomenon Vikipedio kaj funkcias ankaŭ kiel lernolibro, kiu montras kiel oni povas partopreni en la projekto. La libro estis prezentita fine de novembro en la malferma tago de la Centra Oficejo.



Ziko van Dijk

Vikipedio estas speciale interesa pro sia multlingveco. Kiam oni ne trovas artikolon en sia propra lingvo, oni povas rigardi en fremdan. Danke al la multlingveco, Vikipedio estas taŭgega helpilo por tradukistoj, al kiuj la kutime mallongaj priskriboj en vortaroj ofte ne sufiĉas.



Por multaj malgrandaj lingvoj (inkluzive de Esperanto) Vikipedio estas la unua enciklopedio, precipe se oni pensas pri ĝenerala enciklopedio ne limigita al iu temo aŭ la propra kulturo. Jimmy Wales alvokis subteni precipe la lingvojn de la evoluandoj, kiel la araba, bengala aŭ svahila.

La anglalingva Vikipedio estas la plej granda kaj malnova lingvo-versio. Inter tempe fondiĝis pli ol 250 lingvo-versioj; kelkaj jam estas fermitaj ĉar ili ne estis aktivaj kaj ne montris evoluon. Fine de 2006 la Fondaĵo Vikimedio enkondukis regulojn por la akcepto de nova lingvo-versio, tial ne plu estas tiel facile krei novan kompare al antaŭe. La Fondaĵo postulas ke lingvo estu ne difinebla kiel varianto de alia lingvo (do ne plu akceptas dialektojn) kaj ke ĝi havu sufiĉe da parolantoj por fari kreskon supozebla.

Kutime oni listigas la lingvo-versiojn laŭ la oficiala nombro de artikoloj. En julio 2008

la anglalingva havis 2,4 milionojn da artikoloj, la germanlingva 780.000, la franclingva 680.000 kaj la pola 523.000. La esperantlingva havis 101.000 artikolojn kaj tiel atingis la 21-an lokon. Ekzistas ankaŭ tre malgrandaj lingvo-versioj, kiel la ligura kun 2.500 kaj la somala kun 400 artikoloj.

Sed tiuj kaj aliaj statistikoj pri Vikipedio povas multe trompi. Ekzemple la volapuka Vikipedio havas oficiale preskaŭ 120.000 artikolojn, kvankam ekzistas nur kvin registritaj Volapuko-vikipediistoj kun almenaŭ iomete da lingvo-scio. En 2007 unu el ili, la brazilano Sergio Meira, kreis per programeto aŭtomate milojn da artikoloj. Ili konsistas nur el datumbazaj informoj kaj havas tute skeman vortumon. La celo de Meira estis, laŭ lia propra eldiro, fari ion „frenezan“ por varbi por Volapuko. Estiĝis debato ĉu fermi la lingvo-version, sed multaj vikipediistoj subtenis ĝin kaj la agadon de Meira: Ili ofte mem faris same en la propra lingvo-versio. Ankaŭ en la esperanta Vikipedio estas certe kelkaj dek mil pseŭdoartikoloj.



La listigo laŭ la nombro de artikoloj kaj la fanfaronado pri la atingo de la x-mila artikolo kaŭzis do tragikan dinamikon: iuj vikipediistoj kredas ke la celo estas produkti laŭeble multajn artikolojn, anstataŭ taŭgan kaj utilan enciklopedion. Sed por eksteruloj faras ofte malbonan

impreson, kiam ili vidas ke la ilia-lingva versio enhavas nur tiajn pseŭdoartikolojn.

Kiam temas pri Esperanto, la teknika disponigo ekzistis jam pli frue, sed nur la 15-an de novembro 2001 komenciĝis la vera historio de la esperantlingva Vikipedio. Ĝia pioniro estas la usona komputilo-sciencisto Chuck Smith (nask. 1979, esp. februaro 2001), al multaj esperantistoj konata interalie kiel Esperanto-instruisto kaj TEJO-volontulo.



Chuck Smith

En la unua jaro, la Vikipedio en Esperanto estis unu el la plej grandaj lingvo-versioj, ĉar aliaj fondiĝis poste aŭ komence kreskis malpli rapide. Esperantistoj formas tre interreteman lingvo-komunumon kompare al aliaj lingvoj.

Chuck Smith kaj aliaj vikipediistoj havis cetere la bonŝancon ke ekzistas bone organizita Esperanto-movado, per kiu eblas atingi la lingvanojn. Tiel ili reklamis per faldfolioj kaj artikoloj en Esperanto-gazetoj, kaj alparolis homojn dum renkontiĝoj. Ekzemple dum la jubilea aranĝo de la antverpena Esperanto-grupo en majo 2007 vikipediistoj trejniis interesitojn, dum la UK 2008 en Roterdamo vikipediistoj havis entute tri aranĝojn, kaj ĉiu kongresano havis informilon en sia kongressako. Subtenis UEA, Eŭropa Esperanto-Unio kaj E@I. Tiu lasta estas faka asocio kiu okupiĝas pri Esperanto ĉe Interreto, kaj kiu havas laborgrupon pri Vikipedio.

La Esperanto-Vikipedio estas relative granda, tamen ĝi havas multe pli „inti-

man" karakteron ol la anglalingva aŭ la germanlingva. La Esperanto-vikipediistoj ofte konas unu la alian, kaj apenaŭ okazas redaktomilitoj (kiam oni malsamopiniis pri la enhavo de artikolo) aŭ vandalismo. Eble la esperantlingva Vikipedio estas speciale taŭga por fari siajn unuajn paŝojn kiel vikipediisto, kaj nur poste kuraĝi redakti en nacilingvaj Vikipedioj.



Vikipedio povas havi reklaman efikon por Esperanto, en du malsamaj manieroj. Unue, homoj vidas ke ekzistas Vikipedio ankaŭ en Esperanto, ke ĝi estas sufiĉe ampleksa kaj kvalita lingvo-versio. Kiam leganto de alilingva Vikipedio rigardas maldekstre je la parto „aliaj lingvoj“, li vidas ofte ke la koncerna artikolo ekzistas ankaŭ en Esperanto – konvene, nia lingvo-nomo aperas tuj sub *English*.

Due, la diverslingvaj Vikipedioj informas pri Esperanto, same kiel pri multaj aliaj temoj. Oni trovas artikolojn pri Esperanto, Esperanto-literaturo, Zamenhof, UEA, Universala Kongreso de Esperanto, Landaj Asocioj ktp. Krome en pluraj Vikipedioj ekzistas jam „portaloj“ pri Esperanto, tio estas ejoj kiuj informas pri la enhavo rilate al konkreta temo. Estas bone se Esperanto-vikipediistoj atentigas ke ankaŭ en iliaj nacilingvaj Vikipedioj troviĝu bonaj artikoloj pri Esperanto.

Kompreneble la artikoloj pri Esperanto devas esti neŭtrale verkitaj, kiel ankaŭ

ĉiuj aliaj artikoloj. Verkante pri Esperanto oni estu do bonvolema, sed nepre evitu ĉian impreson ke oni intencas reklami („Esperanto estas la plej bela lingvo de la mondo“). Reklami faras malbonan impreson al aliaj (neesperantistaj) vikipediistoj en tiu lingvo-versio, kaj grandas la risko ke ili rapide forigos neneŭtralajn rimarkojn.

Pli da informoj pri la libro en la nova retejo Vikipedio.net

fonto: Libera Folio

La Verda Stelo (Antverpeno)
(Alidirektita el La Verda Stelo Antverpeno)

La **Esperanto-klubo de Antverpeno** estas fondita la [data-missing] La grupo havas anojn en la urbo **Antverpeno** kaj en la variaj vesperoj, i.a. kuirado kaj gustumado, kvizoj, kar La sidejo de la klubo estas en la **Esperanto-domo de A** Honora prezidanto estis **Jules Verstraeten** ekde 1970.

Enhavo [kaŝi]

- Historio
 - Nova starto post la 50a jaro
 - Junuloj ektransprenas la torĉon
 - La Verda Stelo 60-jara
 - La morto de "La Moŝto"
 - Disradie aktivadi!
 - Finfin... La Esperanto-Centro
- Prezidantoj de la grupo
- Ekstaraj ligiloj
- Vikipediistoj kiuj estas anoj de la klubo

parto de artikolo en Vikipedio

Jarfinajn Bondezirojn

sendas al vi

Esperanto
Noord-Nederland



ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen